# *Akceptis Raúl Castro la membron de la nacia asembleo de Vjetnamio.*



Havano, 20 feb (RHK) La kuba prezidento Raúl Castro, akceptis en tiu ?i urbo la membron de la politika buroo de la komunista partio de Vjetnamio, Tong  Thi Phong, anka? vicprezidantino de la konstanta komitato de la nacia asembleo de tiu azia lando, kiu plenumas oficialan laborviziton en la kariba lando invitite de la kuba parlamento.

Dum la afabla renkonti?o amba? dialogis pri la bona stato de la historiaj rilatoj kiuj ligas amba? partiojn, registarojn kaj popolojn, samkiel pri alija temoj de la internacia agento, informis la kuba gazeto Granma.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/122070-akceptis-raul-castro-la-membron-de-la-nacia-asembleo-de-vjetnamio

# Radio Habana Cuba